

KONTAKTO



Kiel obeigi la fajron?
Superstiĉoj – bonaj kaj malbonaj
La kazo de la dua Jugoslavio

numero 229 (2009:1) ISSN 0023-3692

ENHAVO

Mitoj kaj popolaj kredoj: ĉu ili malsamas?

(Flavio Ubezio, Italio) 3

Kulturo, muziko kaj la festivalo

(Gosia Nitkowska, Danio) 4

Obeigi la fajron

(Sergeo Korol, Rusio) 6

La kazo de la dua Jugoslavio

(Etel Zavadlav, Kroatio) 9

Rekte, kuraĝe, elegante (recenzo)

(Mikaelo Bronŝtejn, Rusio) 11

Kleraj superstiĉoj

(Arina Osipova, Rusio) 13

Kiel verki per facila lingvo por Kontakto 14

Kiel sendi kontribuojn al Kontakto?

- ✓ Sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan.
- ✓ Se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Kontakto ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!
- ✓ Indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ Rete bonvolu sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ Ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj!

Koran antaŭdankon!

Saluton, karaj legantoj kaj amikoj de nia revuo!

La nova numero de la revuo, kiel promesite, aperis sufiĉe rapide, ĉu ne? La malfruado ja venkeblas, sed por tio bezonatas niaj komunaj penoj – kaj mi denove varme invitas ĉiujn dezirantojn aktive kontribui al Kontakto!

En ĉi numero vin atendas du artikoletoj pri superstiĉoj (unu – facillingva), tamen, tiu temo certe ankoraŭ ne estas elĉerpita, do, se vi povas ion aldoni – ne hezitu alskribi nin!

Plie, sur la paĝoj de la revuo vi trovos inviton al la ĉi-jara KEF, pensigan artikolon pri la “Kazo Jugoslavio”, recenzon kaj bele ilustritan artikolon pri nekutima hobia – fajro-regado.

Ĉuu la someran libertempon, sed ne forgesu, ke mi ne libertempas kaj ĉiam ĝojos ricevi de vi iujn leterojn kaj – tiom pli! – kontribuojn!

Agrablan legadon!

Paŭlo (la redaktoro)

Temoj de la venontaj numeroj de Kontakto

Numero 230 (2009:2). La ĉef-temo: “Malgrandaj etnoj”. **Rapidu pri la kontribuo!**

Numero 231 (2009:3). La ĉef-temo: “Televido”. Kion kaj kial ni spektas televide? Ĉu en via lando ekzistas iuj specifaj televidaj programoj aŭ televidaj moderigantoj? Rakontu pri viaj televidaj kutimoj kaj preferoj! **La limdato – la 1-a de aŭgusto.**

Numero 232 (2009:4). La ĉef-temo: “Idoloj”. Ĉu estas bone aŭ malbone havi idolojn? Ĉu idoloj nur montras sekvindan ekzemplon aŭ ankaŭ danĝere influas nian personan elekton? Ĉu vi povas rakonti pri la homoj, kiuj laŭ via opinio grave influis vian vivon aŭ la vivon de via lando?

Kiel ĉiam, ajnatemaj kontribuoj estas bonvenaj kaj ege bezonataj!

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)**, eldonata de **Universala Esperanto-Asocio (UEA)**. Fondita en 1963. **N-ro 229** (2009:1). 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/node/7>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ☒ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44; fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** Kontakto, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jalto, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro:** Paŭlo Moĵajev (Ukrainio) **Tipografiisto:** Lucas Vignoli Reis (kun helpo de skipo de Preface Design, <<http://www.preface.com.br>>). **Korektisto:** Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). **Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facillingvaj Artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila kaj facila*, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. **Anonctarifo:** tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas double. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncetaj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn kontraŭ dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifo:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **Kontakto en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): Radio Havano (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea / 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15-a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Mitoj kaj popolaj kredoj: ĉu ili malsamas?

Flavio Ubezio, Italio



Lago Ness, ĉu ĉi tie troviĝas monstro? foto de Taylor Dundee

Kio estas mito kaj kio estas popola kredo? Mito estas simple fantasta rakonto, kutime aperinta en la antaŭskriba tempo kaj kies rolantoj estas, preskaŭ ĉiam, herooj aŭ dioj, dum popola kredo estas ĝuste popola kredo pri io.

Unu el la plej konataj popolaj kredoj, kiu daŭras ekde 590 p.K., estas tiu pri *Nessie*, la monstro de *Loch Ness* en Skotlando. Ĉu ĝi ekzistas aŭ ne? Scienco parolas pri la neekzisto de la monstro, sed la lokaj homoj kaj multaj aliaj ne estas same certaj, male, ili asertas, ke la monstro vere ekzistas kaj ĝia ekzisto ne pridubindas. Kredo pri la monstro ekis, kiam unu irlanda monaĥo rakontis en sia libro (*Vita Columbae*) pri la sanktulo, kies nomo estis Sankta Kolumbao. Foje tiu sanktulo ekvidis funebran ceremonion de homo, kiu loĝis apud la Lago *Ness*. La vilaĝano estis mortigita de granda kaj sovaĝa akvobestaĉo. La sanktulo sukcesis forigi la monstron per siaj preĝoj... Ĉu per preĝoj? Jes, ĝuste tiel! Fakte, li estas sankta, kaj multaj sanktuloj kapablas forigi monstrojn per preĝoj, sed Sankta Kolumbao kapablis fari ankaŭ alian nekredeblan aferon, se kredi al la lokaj homoj: li kopiis librojn nur nokte, kiam li skribis per sia dekstra mano dum la maldekstra prilumis la tablon. Ĉu lia mano prilumis la tablon? Jes, ĝuste tiel! Kiaj fantastaj aferoj!

Kaj jen ekzemplo de unu el la plej konataj mitoj. Temas pri Heraklo: la rolanto, kies ĉefa karakterizaĵo estas treega forto, rolas en multaj rakontoj, en kiuj li faras nekredeblajn aferojn. Ĉiuj tiuj nekredeblaj aferoj, diversloke rakontitaj, estis poste unuigitaj en unu grandan rakonton nomatan "La dek du laboroj de Heraklo". Kiuj estis tiuj laboroj? Kelkaj el ili estis ekzemple: mortigi la nevundeblan Nemean Leonon, ŝteli la orajn pomojn el la ĝardeno de Hesperidoj, porti la hundon kun tri kapoj (kiu gardis la inferon) en Micenon – kaj naŭ aliaj. Se oni iom pli bone informiĝas pri eĉ nur unu el la supre menciitaj laboroj, oni tuj komprenas, ke la tuta rakonto estas vere fantasta. Ekzemple, ĉu povas ekzisti la hundo kun tri kapoj (kial ne kvar aŭ kvin)? Ĉu vere la pordo de infero troviĝas en Sparto (ĉu iu iam vidis tiun pordon, kiam li estis en Sparto)?

Nun, kiam vi, leganto, legis pri mito kaj popola kredo, ĉu vi trovas malsamaĵojn inter ili? Ili ja havas similajn fantastajn karakterizaĵojn, sed se en la mito tiu fantasteco estas tuj videbla al ĉiu, en la popola kredo tiaj karakterizaĵoj ofte estas speciale celitaj por kredemuloj, kiuj eble opinios ilin veraj.

Kulturo, muziko kaj la festivalo

Al la demando “Kio estas Esperanto?” oni plej ofte respondas: “Ĝi estas lingvo” aŭ “Ĝi estas planlingvo”, kelkaj dirus “lingvo artefarita”... Oni foje forgesas, ke Esperanto estas ankaŭ filozofio, vivstilo, kaj ke ĝi estas kulturo – kulturo alternativa. Aliflanke, Esperanto konsistigas alternativan kulturon – alternativan al naciaj kulturoj. Esperanto kunigas homojn de diversaj landoj, lingvoj kaj kulturoj, do ĝi multe kontribuas al t.n. tutmondiĝo. Ĝi estas kulturo originala kaj internacia, kulturo varia en sia formo. Unu el la plej popularaj formoj de la kulturo estas muziko.

Gosia Nitkowska, Danio

Galope tra Esperanta muziko

Kiel lingvo Esperanto estas tre melodia kaj tial Esperanto-kantoj aperis tuj post la naskiĝo de la lingvo. Oni tuj muzikigis la unuajn poemojn en Esperanto, el ili la Esperanta himno “La espero” estas konata al ĉiuj esperantistoj. En 1920 Raymond Schwartz fondis la unuan Esperantan kabaredon “Verda kato”. Komence amato, poste ĉiam pli kaj pli profesie artistoj verkis kantojn kaj ludis muzikon laŭ Esperantaj tekstoj. Influita de la mondaj tendencoj, Esperanto-muziko trapasis la fazon de revoluciaj kantoj, poste – la fazon de la engaĝitaj kantoj de la 60-aj kaj 70-aj jaroj, influitaj de usonaj kaj okcidenteŭropaj artistoj kiel Bob Dylan kaj *The Beatles*. Tre grava epoko en Esperanto-muziko estas la tempo de la t.n. aŭtoraj kantoj (Georgo Handzlik, Mikaelo Bronŝtejn, Ĵomart Amzeev kaj Nataŝa Gerlaĥ k.a.).

En la 80-aj jaroj komenciĝas la nova periodo en la historio de Esperanto-muziko, periodo de esporokmuziko kun la unua internacia Esperanto-rokbando “Amplifiki”. Aperas novaj bandoj, ofte okaze de esperanto-kongresoj kaj festivaloj. “Amplifiki” mem estis “produkto” de Esperantaj junularaj aranĝoj kiel IS kaj IJK. En 1986 okaze de la unua Kultura Esperanto-Festivalo en Svedio naskiĝas la nova bando “Persone”.

Festivaloj kaj kongresoj estas bonegaj okazoj por renkontiĝi kaj kune koncerti, dum ili aperas ideoj pri novaj kunlaboroj kaj projektoj. La menciita Kultura Esperanto-Festivalo (KEF), kiu estas la plej granda Esperanto-festivalo en Norda Eŭropo, donas specialan okazon por tio, ĉar kutime partoprenas ĝin multaj diversstilaj Esperanto-artistoj. Dum la lasta KEF en 2005 en Helsinko (Finnlando), ekzemple, membroj de la nuna “Espo Despo” konatiĝis kun Alejandro Cosavella (argentina espokantisto) kaj Anja Karkiainen (finna aŭtorino de tekstoj kaj poemoj



Kim Henriksen kaj JoMo koncertas en IJK 2005, Zakopane, Pollando
foto de Sjoerd Bosga

en Esperanto) – kaj la renkonto rezultigis kunlaboron pri la nova albumo de “Espo Despo”, kiu ĝuste nun estas eldonata.

“Espo Despo” estas la ekzemplo de ankoraŭ unu muzikstilo, la mondmuziko, kiu iĝas pli kaj pli populara en la movado. Krom Eŭropo novaj reprezentantoj aperas en Afriko, proponante al ni espomuzikon influitan de afrikaj ritmoj (FreeMagniZhou, Afrika Espero, k.a.). Ankaŭ modernaj stiloj kiel repo aŭ tekno estas proponataj fare de la Esperantaj artistoj.

Post 13 jaroj KEF revenas en Danion

Ĉi-jare la vica KEF okazos en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo) – Helsingør (Elsinoro) – inter la 7-a kaj 12-a de julio 2009. Jam la naŭan fojon junuloj en Nordio aranĝas la Kulturen Esperanto-Festivalon, kiu ĝis nun estis organizita en Svedio, Finnlando kaj Danio. Ĝi estas festivalo, kiu prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon.

KEF estas ne nur la loko, kie Esperanto-artistoj povas renkonti aliajn artistojn, sed ĝi estas ankaŭ la loko, kie publiko povas interkonektiĝi kun la abunda vivo de la Esperanto-kulturo, spektante multajn koncertojn, teatraĵojn kaj literaturajn prezentojn. Oni ankaŭ mem povas aktive partopreni en multaj metiejoj: interalie, vi povas lerni versi en Esperanto, partopreni danc-atelieron, legi kaj fari komiksojn, ludi ludojn en Esperanto, ktp. Nur en KEF vi povas karaoke-kanti en Esperanto, ne kun maŝino, sed vive kun la artistoj mem! Se vi estas infano, vi povas iĝi membro de la unua rokbando por infanoj aŭ fari la unuan cirkon en Esperanto!

Ĉi-somere la partoprenantojn distros amaso da konataj Esperanto-artistoj: jam nun ni scias, ke venos Ĵomart kaj Nataŝa, Martin Wiese kaj la Talpoj, Hotel Desperado, La Perdita Generacio, Pafklik kaj D.C. Initials, kaj pluraj aliaj artistoj estos anoncigitaj en la hejmpaĝo. Dum ĉiu nokto Flo de Vinilkosmo estos diskotekon kun dancmuziko nur en Esperanto. Cetere vi povos ankaŭ spekti filmojn en Esperanto.

La festivalo estas festivaleja en sia formo, tiusence ke oni loĝos modeste kaj tiamaniere la kostoj ne estos tiom altaj, kvankam Danio estas unu el la plej multekostaj landoj de la mondo. Kompreneble eblas ankaŭ loĝi pli lukse en migrul-ĥejo aŭ en hotelo kontraŭ aldona pago.



JoMo koncertas en IJK 2005, Zakopane, Pollando *foto de Sjoerd Bosga*

Konsiderindas ankaŭ, ke en la semajno tuj antaŭ KEF en Danio okazas la plej granda Rokfestivalo en Nord-Eŭropo – Roskilde Festivalo. La Dana Esperanto-junularo (DEJO) organizas senpagan Esperantan renkontiĝon dum la festivalo. Ĉiuj laboros 24 horojn en la DEJO-budo (dum okhoraj periodoj). Dum la resto de la tempo vi povas festi kun la aliaj, aŭskulti koncertojn kaj eĉ gajni monon por partopreni KEFon. Bonvenon al la festivalo!

RETE

<http://kef.saluton.dk/> – la paĝaro de la festivalo



Homoj amuziĝas dance dum IJK 2005, Zakopane, Pollando *foto de Sjoerd Bosga*

Obeigi la fajron

Dum tuta sia historio la homaro sentis timon antaŭ la fajro, kaj tamen havis la bezonon uzi ĝin por la vivo. La fajro donis al la homo varmon kaj lumon, kaj sur la fajro ni ekde antikveco kuiras manĝaĵojn. Sed la fajro kaŝas en si ankaŭ mortan danĝeron: sufiĉas por kelkaj momentoj perdi la kontrolon super ĝi – kaj neeviteblos granda malfeliĉo. Tamen ekzistas homoj, kiuj malsovaĝigis la fajron, faris ĝin obeema, konkeris ĝin. Fakte, ne klaras, tamen, kiu kiun konkeris...

Sergeo Korol, Rusio

Ne eblas diri certe, kio estas la fajro-spektaĵo. En ĝi estas nature interplektitaj tiaj artoj, kiel cirko, akrobatado kaj danco. Tiu arto aperis en antikva tempo sur la insuloj de Oceanio. Ne temis pri iu poramuza spektaĵo; por la oceanianoj la fajro-spektaĵo estis speco de prepariĝo por armeo – la viroj turnis ŝtonetojn, fiksitajn al ŝnuroj, por plifortigi kaj trejni la muskolojn. Tiu gimnastikilo nomiĝis *poi*, kaj tiun okupon oni poste nomis “*poing*” laŭ la angla maniero. Ankaŭ la virinoj okupiĝis pri ĝi – *poing* bonege trejnas lertecon kaj helpas senzorge pasigi la tempon.

Iom post iom la arto turni diversajn objektojn, fiksitajn al ŝnuro, penetris ankaŭ en malnovan Eŭropon. Ĉi tie pri ĝi okupiĝis ĉefe vagantaj cirkistoj. Komence ankaŭ ili uzis ŝtonetojn aŭ iujn aliajn objektojn, sed poste iu elpensis ĉirkaŭvolvi la objekton per kapra lano, trempi ĝin en bruleman oleon aŭ gudron kaj bruligi. Ĝuste tiel naskiĝis

la fajro-spektaĵo. Dum jarcentoj ĝi ŝanĝiĝis tre malmulte.

Nun pri la fajro-spektaĵoj okupiĝas kaj profesiuloj, kaj amatoroj. Indas diri, ke *poing* estas unu el la elementoj de hipia subkulturo, tial multaj fajristoj apartenas al hipia movado.

La ŝtonetoj estas nun anstataŭigitaj per ŝtalo, asbesto kaj kevlaro*, la oleo estis anstataŭigita per keroseno. Eĉ la lumo mem iĝis artefarita – *poi* foje estas farataj el lum-diodoj. Nur unu aferon la homoj ne sukcesis ŝanĝi aŭ plibonigi: ankaŭ la modernaj fajristoj, same kiel iliaj antikvaj kolegoj, devas superlukti la praan timon antaŭ la fajro.

Fajristoj

La homo estas tiel aranĝita, ke li konstante serĉas la vojojn kaj manierojn por eksperimenti. Ankaŭ la fajristoj estas homoj, riĉaj je scivolemo. Finfine la uzado de nura *poi* iĝis



komplezo de la aŭtoro



por ili nesufiĉa. Oni komencis inventi novajn fajrajn ilojn, kaj hodiaŭ inter la fajristoj eblas distingi kelkajn ĉefajn “profesiojn” aŭ skolojn.

Poiistoj estas la fajristoj, kiuj “laboras” per *poi*. La modernaj *poi* konsistas el meĉo (kiu estas trempata en bruleman substancon), tenilo (je kiu la mano de kuraĝa fajristo tenas tiun danĝeran ludilon) kaj ĉeno, kiu konektas la tenilon al la meĉo. La meĉo estas farata el asbesto aŭ kevlaro – tiuj materialoj bone sorbas la brul-miksaĵon, tamen ne forbrulas. La teniloj povas havi kiun ajn formon; ĉiu fajristo havas siajn proprajn preferojn tiurilate. Kaj la ĉeno devas esti malpeza kaj fortika por ke la meĉo ne flugu akcidente al la spektantoj. *Poiistoj* estas la plej multaj inter fajristoj. Tio povas esti klarigita per tio, ke regado de tiu instrumento estas relative facila – oni povas prezenti la bazajn elementojn jam post kelkaj monatoj da ekzercoj.

Stangistoj uzas specialan stangon, ĉe kies du ekstremaĵoj estas fiksataj la meĉoj, foje ankaŭ lum-diodoj. La tekniko ludi per la stango ege diferencas de la *poi*-tekniko, ĉar la rigida kaj peza stango diktas siajn proprajn regulojn. Pli ofte la stangoj estas regataj de viroj. Malgraŭ la ŝajna simpleco (simpla bastono, kiun necesas turni sen brulvundi sin) la stango estas tre malfacile regebla ilo, kiu tamen povas prezenti vere magiajn trukojn en la spertaj manoj. La veraj majstroj povas turni ĝin sur la korpo sen uzi la manojn, blinde suprenjeti kaj kapti ĝin kaj fari ankoraŭ multajn nekredeblajn aferojn.

Ventumilstoj turnas specialajn ventumil-formajn objektojn, faritajn el kunfanditaj maldikaj radioj, kiuj estas ĉe unu ekstremaĵo fiksataj al ronda tenilo kaj ĉe la alia

ekstremaĵo havas meĉon. La tekniko regi la ventumilon similas al tiu de *poi*-regado, tamen postulas apartan plastikecon de korpo-movoj, tial inter ventumilstoj relative multas virinoj. La ventumiloj brulas pli forte, ol *poi*, kaj estas pli pezaj, ol la stangoj. Tial la regado de tiu objekto postulas ne nur kuraĝon kaj majstrecon, sed ankaŭ grandan eltenemon. La virinoj, kiuj uzas la ventumilojn, ofte uzas dum sia prezentaĵo danc-elementojn, kio faras la spektaklon pli alloga.

Krom tiujn bazajn instrumentojn la fajristoj uzas ankoraŭ multajn aliajn. Ekzemple, estas uzataj la grandaj *poi* (la t.n. “kometoj”) kaj ties serpentume kurbigita speco (la t.n. “serpentoj”). Foje troveblas eĉ pli ekzotaj iloj, ekzemple “fajra kubo” aŭ piroteknikaj *poi*, kiuj elŝprucas faskojn da fajreroj. Krom la iloj, kiuj uzas la “naturan fajron”, multas la instrumentoj kun artefaritaj lumiloj. Ili estas popularaj inter tiuj, kiuj timas la “vivan” fajron aŭ volas evoluigi la fajro-spektaklon kiel specon de moderna arto.

Fajrospektaĵo estas tre dinamika arto. Regule aperas novaj elementoj, dum la malnovaj iom post iom transiras el la kategorio de tre malfacilaj al la grupo de tute kutimaj elementoj, kiujn regas ĉiu ajn.

Subkulturo

La fajristoj formas veran subkulturon. Ili havas siajn proprajn interretajn vendejojn de la ekipaĵoj, multajn forumojn por interkomunikiĝo. En interreto spekteblas multaj plej diversaj videoj, dediĉitaj al la fajro-arto: ekzemple, la instruaj (kiuj en komprenebla maniero klarigas, kiel



studi tiun aŭ alian elementon) aŭ la demonstraj – la t.n. solo-videoj, kiuj prezentas apartajn fajristojn, kiuj demonstras sian talenton.

Ĉiujare en la mondo estas organizataj dekoj da specialaj kunvenoj kaj fajro-festoj, al kiuj venas kaj junaj kolektivoj, kaj spertaj fajristoj – la mondaj steluloj. Jes, vere, inter la fajristoj de la tuta mondo troviĝas siaj steluloj kaj herooj. Indas mencii, ke plej famas la fajristoj el Japanio, Germanio, Usono kaj Ukrainio.

Kiel komenci?

Ĉu vi, kara leganto, ekinteresiĝis pri tiu arto kaj decidis mem ekokupiĝi pri ĝi? Por komenco mi konsilas al vi serĉi la samideanojn en via urbo. Nuntempe en preskaŭ ĉiuj pli-malpli grandaj urboj troveblas la fajristaj teamoj. Certe, studi la arton sub la gvido de pli spertaj samideanoj estas

multe pli simple, ol fari tion memstare.

Sed eĉ se vi trovis neniun – ne malesperu! Eble vi estas destinita iĝi la unua fajristo en via urbo. En interreto eblas trovi multegajn informojn pri la afero – la instrukciojn pri *poi-farado*, videajn lecionojn, forumojn, en kiuj oni povos helpi al vi pri tio, kiel komenci.

Eblas diri, ke la fajro-spektaĵo estas kvazaŭ Esperanto – ĝi estas subkulturo de homoj, kiuj ricevas plezuron el sia hobbio. Interesiĝu pri fajro-spektaĵo, Esperantumu kaj ne perdu la intereson al la ĉirkaŭa mondo, ĉar ĝuste intereso movas la homon antaŭen!

NOTO

Kevlaro (el la angla *Kevlar*, kiu estas la var-nomo) – sinteza materialo, kelkfoje pli fortika, ol ŝtalo.

La kazo de la dua Jugoslavio

Dekstrema fluo venkis okaze de elektoj 1990 en Kroatio. Homoj esperis multon, sopiris ŝanĝojn. El predikejoj klerikoj konvinkis la amasojn, ke pri la mizero kulpas serboj. Ke ni sekvu la helan ekzemplon de najbara ŝtato Slovenio, ĉiam pli progresema, pli civilizita, pli eŭropeska. Kaj ni disiĝis de la restaĵo.

La dua Jugoslavio mortis en agonio. Ĝin disrompis ne la eksteraj malamikoj, pri kiuj ni ĉiam estis avertataj dum edukprocezo. Filo Bruto murdis la patron – kvina kolono, interna. Komence regis ravita unuanimeco, plifortigita per militaj okazoj. Ĉiam pli profunda abismo inter *ni* kaj *ili*...

Etel Zavadlav, Kroatio



Postrestaĵoj de la Jugoslaviaj militoj foto de Johann Bitsoenn

Estimata leganto, mi streĉas min verki pri tiu temo, ne pro tio, ke la verkado malfacilas por mi, sed pro tio, ke la temo estas iel malagrabla. Prefere mi parolu pri tio kion mi pensas kaj sentas persone, ligite kun la temo.

Pri politiko mi ne tro okupiĝas – mi preferas esti artisto. Platono dividis noblajn homojn je artistoj, filozofoj, religuloj kaj politikistoj. Sed tiuj politikistoj de Platono devis estis honestaj, ekzemploj de moralo kaj senriproĉa konduto. “Se noblaj animoj ne okupiĝos pri politiko, kruduloj avidaj kaj malindaj prenos la bridajn, kondukante popolon rekte al disfalo”, li skribis.

Tiajn politikistojn hodiaŭ mi ne konas; ĉu en Kroatio, ĉu en la tuta mondo. Ankaŭ la firmaj kontraŭantoj de la uson-imperia politiko (Morales kaj Chavez) ne elradias noblecon – eĉ male. Malgraŭ ilia ribelema rigideco, ili lasas en mi ridindan impreson. Sed reen al la dua Jugoslavio. La unua ekzistis inter la du mondmilitoj. La tria... neniam.

Tie mi naskiĝis, en tiu Jugoslavio. Kaj tiu demando estas por mi pli malplaĉa, ol multaj aliaj. Ĉar mi hontas, kvazaŭ mi mem kulpas pro perfido de *pionira ĵuro*. (Ha, ne, ne, mi ne estas sentimentala ploremulino, mi akceptis la ŝanĝon, ĉiujn ŝanĝojn mi al kutimiĝis akcepti; kaj morton



de la patro, kaj forvendon de la familia domo, kaj... kaj... kaj disfalon de Jugoslavio. Jes – premu la dentojn – ĉio ja estas nur portempa... bla-bla...)

La politika partio HDZ (Kroata Demokrata Unio) prenis la stirilon kaj traktis la ŝtaton kiel sian posedon. Prirabis ĉion rabeblan, ŝtelis ĉion ŝteleblan. Kio plej ĝenas – Tuđman subskribis kontrakton kun Wojtyła en Vatikano, kaj donacis al li preskaŭ ĉion, kio iam apartenis al popolo. Kaj nmoveblaĵojn, kaj altajn salajrojn al pastroj (!), kaj partoprenon en regado. Kateĥismo oni revenigis en lernejojn – kiel en mezepoko. Pri tio ĉi mi jam verkis en mia debuta artikolo (marto 2007) en “Sennaciulo”, kaj malvolonte mi ripetis jam diritan.

Io alia sin kaŝas en la homa estaĵo – instinkto por iu aparteno. Deziro esti parto de iu grupo. Kvankam kiel anarkiisto mi abomenas titolojn. Do, se iu alilandano kritikas aŭ ofendas la nunan Kroation, mi ne toleras tion.

Estas mia hejmlando – kia ajn. Primitiva patriotismo, dekstremo, naciismo... nomu tion kiel ajn – sed neniuj alia ŝtato pagas por mi sanasekurojn dum senlaboreco, nek iu alia ŝtato zorgis ke miaj infanoj povu senpage frekventi lernejojn, eĉ ricevi senpagajn lernolibrojn kaj senpagajn manĝojn lerneje. Malmulte, jes, tamen iom.

Krome, persono sen radikoj dubindan valoron havas. Kiom antikve dirite – tre eksmode! Kaj mi ne volas ĵeti la ostojn de mia forpasinta iama hejmlando, nek montri aĉan nudan korpon de mia nuna hejmlando al legantoj kiel vi, por ke vi ronĝu tiujn ostojn kaj ridu pri tiu nudeco. Tamen temas pri io iumanere mia – kaj ne via. Kiam edzino priklaĉas la edzon kun amikino, kaj amikino aprobas – “Jes, kara, via edzo vere estas fiulo”, tiu unua tuj sentas sin ofendita kaj ekmalamas la amikininon.

Eble mi estas ĉi-okaze stulta rozkolora virineto kun papilotoj (neeee!), gladilo en la dekstra kaj kirlilo en

la maldekstra mano, en hejmpantofloj, kiu legas rub-legaĵojn kaj neniam preterlasas hispanlingvan telenovelon je la 12.35, kiu nutras animon per klaĉoj kaj per vizitado de grandaj magazenoj... sed mi ne povas skribi pri politikaj unioj kaj ilia unueco en dua Jugoslavio.

Efektive, kapdoloron mi suferas pri tiuj temoj ĉiutage, aŭskultante tagmezajn TV-novaĵojn. Senpacienca, ke komenciĝu mia hispanlingva telenovelo je la 12.35 – tiuj novaĵoj daŭre-e-egas...

RECENZO

Rekte, kuraĝe, elegante!

“Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto”. Wendy Heller. Tradukis B. Westerhoff. FEL. Antverpeno. 2007. 398 paĝoj. Prezo: 27.60 €

Mikaelo Bronŝtejn, Rusio

Estante ekde jardekoj arda ŝatanto de biografiaj verkoj, mi konvinkiĝis ke,

1. ĉiu ajn biografia verko ne povas esti konsumita unuglute, ĉar estas fakte la homa vivo, kiun vi emas enkapigi kaj kompreni;
2. ĉiu ajn biografia verko ne estu akceptata kiel veraĵo en la lasta instanco, t.e., se la persono interesas min, mi ne pigru eltrovi almenaŭ unu-du aliajn informfontojn pri la persono.

Do, kiam min atingis la freŝeldonita de FEL libro “Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto”, tiu libro estis por mi ne la unua fonto de scio pri koncerna persono. Sed, traŭginte la libron kun apliko de mia unua konvinko, t.e. dum kelkaj monatoj, farante paŭzojn inter la ĉapitroj, mi rajtas opinii ĝin esence fundamenta kaj faktopluna verko, utila por la esperantologio. Ankaŭ leginda de ĉiu, kiu ŝatas mergiĝi en la historion ne nur de nia movado, sed de tiu epoko kruela, mondrenversa, eventoriĉa, kia estis la unua duono de la XX-a jarcento.

La vivo de Lidia Zamenhof, glora kaj kompatinda filino de la Majstro, la vivo, kiu daŭris nur tridek ok jarojn kaj estis feroce rompita kune kun ses milionoj da aliaj judaj vivoj, la vivo brila kaj sindona – sendube meritis detalan intervenon de sperta biografiisto. Estas grava bonŝanco, ke tiun intervenon efektivigis Wendy Heller, profesia lingvisto kaj renoma verkistino. Estas grava bonŝanco, ke la libro estis verkita en la angla kaj eldonita en Oxford. Ĉar, laŭmerite okupante bretlokon apud gravaj biografiaj esplorverkoj, la libro pri Lidia Zamenhof nepre altigos aŭtoritaton de Esperanto – kaj de la lingvo, kaj de la movado. Estas grava bonŝanco, ke (ho ve, – nur post pli ol

dudek jaroj!) per komuna laboro de la tradukinto Bernhard Westerhoff kaj la aŭtorino mem, la biografio de Lidia, ensorbinta suplementan faktaron, intertempe akiritan, atingis esperantlingvan leganton.


De jaro al jaro la vivobildo de Lidia Zamenhof estas fideinde disvolvita en 30 ĉapitroj kaj prologo kun epilogo. Tiun bildon abunde ilustras diraĵoj de la protagonistino mem kaj ne malpli abunde – diraĵoj de la ĉirkaŭintaj homoj pri ŝi. Ankaŭ sesdek bonkvalitaj fotoj, karikaturoj kaj dokument-kopioj. Antaŭparoloj – por la anglalingva kaj por la esperanta eldonoj, fontindikoj kaj indekso inde kompletigas la verkon.

La aŭtorino povus komenci la rakonton pri Lidia ekde ŝia naskiĝo, garninte, eble, la komencon per kurta ekskurso en la vivon de la parenkaro kaj per referencoj al kelkaj biografiaj verkoj pri la eminenta patro. Sed ŝi ne iris tiun vojon. “Ĉar ne eblas kompreni Lidia-n, ne konante Ludovikon, ŝia historio vere komenciĝas per la lia.” – kun tiu opinio Wendy Heller enlibrigas tri unuajn ĉapitrojn sen Lidia, donante per ili bazajn konojn pri la vivo kaj vivkonceptoj de ŝia patro. Sinsekve la tri ĉapitroj havas nomojn: “La doktoro kaj la revo”, “Esperanto” kaj “La Interna Ideo”. Pozitivaj opinioj pri Ludoviko kaj pri Esperanto-movado nepre influas formiĝon de la sama opinio ĉe leganto neesperantista. Normale Ludoviko ĉeestas ankaŭ en postaj tri ĉapitroj – jam kun la rolo de patro, edukanto kaj inspiranto. Tiun ĉi lastan rolon vere gravas kompreni por ne miri poste, ke la filino, en infanaĝo indifera pri la inventaĵo de sia patro, perdinta lin ĉe sia aĝo nur dekkvarjara, tamen akceptis lian vojon kaj restis fidela al lia ideo dum la tuta vivo.

“Rekte, kuraĝe, elegante!” – jen estis la ĉefa vivslogano de Lidia, iom ŝanĝinta la vortojn de Ludoviko, la slogano por ŝia konscia vivo, por la mondovojaĝo celanta propagandi kaj instrui Esperanton. La libro montras maturiĝon de Lidia kiel Ĉe-metoda instruistino kaj ŝian triumfan instruadon en eŭropaj landoj. En nia dudek unua jarcento, provizanta abundajn logaĵojn, ni pene povas imagi cent-personajn pagatajn kursojn de Esperanto. Sed Lidia rikoltis tiujn en multaj urboj kaj sukcese gvidis siajn milojn da gelernantoj en Esperantujon. Tiun gloran vivoparton la aŭtorino prezentas kun skrupula detaleco. Ankaŭ la sekvantan usonan periodon, ombritan per malsanoj, malestimo kaj eĉ klaĉado de kelkaj esperantlingvanoj – ho, tiutempa ekstera trankvileco de Lidia estas enviinda kaj imitinda!

Jen kaj jen intervenas en la ĉapitroj la bildoj de naskiĝanta kaj evoluanta nazia koŝmaro. Tiun akompanas nehoma malamo al unu gento, al judoj – ne nur en la nazia Germanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉefe en Pollando, la patrujo de Esperanto kaj de Lidia. Wendy Heller donas al la leganto komprenon pri radikoj de tiu malamo: dum malbonaj vivkondiĉoj de la intermilita tempo la politikistoj devus inventi iun kulpulon por pravigi suferojn de siaj popoloj. Per speciale inventata, konstanta, senhonte kalumnia agitado, ili sukcese enkapigadis al la amasoj, ne ŝatantaj mediti kaj analizi, ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio. La situacio pli kaj pli ardiĝas en 1938. Tiam la germana registaro decidas deporti ĉiujn polaj judojn, loĝintajn dum multaj jaroj en Germanio, reen al Pollando, sed la patrolando ne volas akcepti ilin!

Tamen, mi pensis, kiel tio koncernu Lidia-n? Ja tiutempe ŝi estis en Usono kaj havis plurajn invitojn por gvidi Ĉe-kursojn. Kiel do okazis, ke tiu plezure akceptata, atendata kaj dezirata instruistino estis devigita reiri en Eŭropon, en Pollandon, renkonten al sia morto? La libro detale prezentas evoluon de la eventoj, do mi konkludas, ke parton de la kulpo pri ŝia pereco prenas multaj homoj. La usonaj burokrataj instancoj, postulintaj ŝian foriron – ĉu ili ne estis informitaj pri la situacio en Pollando? Mi dubas. La kanadaj esperantistoj, rifuzintaj la inviton por Lidia – pro antaŭvidataj komplikaĵoj ĉe preparo de la dokumentoj. La religia gvidanto de Lidia – lin ŝi demandis ĉiam antaŭ fari vican paŝon en la vivo. Jes, li telegrafis, rekomendinte reveni en Pollandon, sed loĝante en Persio li eble ne havis ĝustajn informojn pri la minacoj por la judoj en Eŭropo. Ankaŭ Lidia mem, kies kristala pureco ne permesis mensogi, do ĉe enketo ŝi skribis honeste, ke estis ricevinta monon por sia kursgvidado, sekve malobeis la usonajn leĝojn... “Se mi forlasis Amerikon, – skribis ŝi al franca korespondanto, – eble estas pro tio, ke Dio preferis, ke mi laboru en alia lando. Kaj en la elekto de io la decida



konsidero estas ne mia kontenteco, ne mia plezuro, nek eĉ mia sekureco – sed la laboro, kiun mi povas kaj devas fari”.

Ĝis nun mi neniel menciis la konatan fakton, ke Lidia estis adepto de la Bahaa religio. Ankaŭ tiu ŝia vivlinio ĉiupaŝe ĉeestas en la libro de Wendy Heller. La Gardanto, Shoghi Efendi, kiun ŝi konsultas konstante. Ŝiaj multnombraj geamikoj-samreligianoj, ame kaj helpeme akceptantaj ŝin en ĉiuj landoj. Ŝiaj pensoj, venintaj en ŝiajn leterojn – pri Dio, pri la kredo, pri ligo inter la Bahaa religio kaj Esperanto. Al mi, ateisto pro analfabeteco, plaĉas, ke la aŭtorino neniom trudas al la legantoj la religiajn preferojn de Lidia, rakontante pri tiuj egale samkiel pri ĉiuj vivnuancoj, gravaj por la biografio.

La traduko legeblas senpene, ĝuinde, sed fojfoje mi stumblis ĉe kelkaj frazoj, nekutime konstruitaj aŭ ĉe vortoj, nePIVe uzitaj. Mi kursivigu kelkajn ekzemplojn: “Multaj venis el eksterlando por viziti d-ron Zamenhof, preskaŭ kiel pilgrimadon”. (p.59) “Sur la scenejo staris la eta Lidia, ŝia aparato, respektive tradukanto kaj du aliaj esperantistoj. (p.199) “Lidia iris hejmen al Varsovio dum kelkaj semajnoj...” (p.232). Sed se mi pritaksu la tuton, certe, la laboro de Bernhard Westerhoff meritas sinceran dankon.

Kleraj superstiĉoj

Ial skribi pri popolaj **superstiĉoj** ŝajnas al mi neinteresa afero... Vidu mem, krom diversaj landoj kaj ŝtatoj ni ja havas multe da aliaj interesaj “anguloj” de la mondo. Bona ekzemplo estas la **studentaro**, ĉe kiu regas propraj leĝoj, tradicioj kaj certe superstiĉoj. Kaj la tempo de ekzamenoj estas sen-dube la periodo plej riĉa je superstiĉoj dum la tuta studenta vivo. Kiu alia krom studentoj kapablas el-pensi tiom da manieroj faciligi sian vivon kaj ne suferi pro legado de siaj ne-kompren-eblaj kaj saĝaj lerno-libroj?

Arina Osipova, Rusio

facila

Do, kompat-indaj gejunuloj dum la tuta nokto antaŭ la ekzameno penas savi sin el la malfacila stato. Amuze, ĉu? Preskaŭ ĉiu studento kreas superstiĉojn por si mem. Li elpensas tion, kio taŭgas nur por li. Sed la ĉefa principo estas ĉiam la sama: ricevi la bonegan stud-poenton kaj fari nenion sam-tempe. En Rusio, ekzemple, preparado al ekzameno estas proksim-ume tia:

- » Tre grava afero estas via aspekto. Oni diras, ke ne indas lavi sin (precipe siajn harojn), ankaŭ ne indas for-tranĉi la **ungojn**. Ĉu vi demandas, pro kio? Mi havas du respondojn. Eble, la studentoj simple timas tia-manierne for-viŝi ĉiujn sciojn... Ekzistas ankaŭ pli “scienca” klarigo: la instruisto povas simple ne re-koni vin en via nova aspekto. Kaj al li tuj aperos duboj: ĉu vi en-tute vizitis liajn lecionojn?
- » Estas dezirinde sur-havi iun ajn “feliĉan” vestaĵon. Oni opinias, ke ne indas ŝanĝi la vestaĵon, en kiu vi ricevis bonan stud-poenton. Ankaŭ ne necesas lavi ĝin. Kaj en Pollando junulinoj certas, ke nur sur-met-ita ruĝa sub-vesto povos helpi sukcese tra-pasi ekzamenon. Estas interese, ĉu ankaŭ la knaboj devas sekvi tiun kutimon?
- » La grandan gravecon havas ankaŭ diversaj **talismanoj** kaj ŝatataj aĵoj – ĉio, kio estas agrabla por vi.
- » Nokte antaŭ la ekzameno vi ne devas dormi kun via ŝatata lud-ilo. Estas prefer-inde dormi kun siaj kajeroj kaj lernolibroj, kiujn necesas meti sub la **kusenon** – ili nepre sub-tenos vin kaj sendos al vi sian forton. Jes, la kuseno tiel iĝos iom malmola, sed por bonaj studentoj tio ne estas problemoj!
- » Por pligrandigi viajn ŝancojn pri sukcesa ekzameno eblas peti la gepatran helpon. Iuj gepatroj **mallaŭdas** siajn gefilojn dum la ekzamenoj, la aliaj metas siajn fingrojn en **inkon**. Hm... Kaj la plej bonaj gepatroj, kiuj plej forte amas siajn infanojn, verŝajne devas meti la manojn en inkujon kaj paroli mallaŭdajn vortojn samtempe. Sed en ĉiu okazo ankaŭ la gepatroj

respondekas pri via feliĉa kaj sukcesa estonteco.

- » Kaj laste: nepre ne forgesu pri **5-rubla** aŭ **5-kopeka** monero, kiun necesas meti en la maldekstran ŝuon sub la piedon.

Kaj fine ni havas tre belan bildon: sen-zorgaj, mal-puraj gestudentoj en mallongaj vestaĵoj (por ke ĉiuj povu vidi iliajn subvestojn), dormetante venas al la ekzamenanto, apenaŭ movante la piedojn (ĉar estas sufiĉe malfacile iri, kiam viaj ŝuoj estas plenaj je moneroj). Kaj la kompatinda patrino dum la tuta tago tenas siajn manojn en inkujo...

Ĉu estas iu senco en tiuj superstiĉoj? Jes, tiel la studentoj almenaŭ sentas sin pli trankvilaj kaj certaj. Sed tamen ĉu povas eĉ ĉiuj superstiĉoj de la tuta mondo savi tiun, kiu dum la tuta jaro ne malfermis la lerno-librojn kaj esperas nur pri la bon-ŝanco?

VORTARETO

inko – nigra “akvo”, per kiu oni skribas sur papero

kopeko, rublo – mono, uzata en Rusio

kuseno – mola objekto, kiun oni metas sub la kapon dum dormo

laŭdi – diri bonajn vortojn pri iu/io

superstiĉo – kredo pri malveraj, nenaturaj aferoj,

ekzemple, ke la nigra kato povas kaŭzi malbonaĵon

studento – homo (plej ofte juna), kiu studas en universitato

talismano – iu objekto, pri kiu oni kredas, ke ĝi havas super-naturajn defendajn povojn

ungo – malgranda malmola el-kresk-aĵo el fingro, kiun oni de tempo al tempo for-tranĉas

Kiel verki per facila lingvaĵo por Kontakto?

Kiam vi verkas por komencantoj eble vi pensas: “Mi devas uzi facilan lingvaĵon. Kion mi povas diri per ĝi?” Provu pensi anstataŭe: “**Mi volas komuniki ion. Kiel mi povas esprimi ĝin per facila lingvaĵo?**”.

Eble vi trovos dum la verkado, ke estas pli facile unue verki la artikolon per normala lingvaĵo kaj poste simpligi ĝin. Ankaŭ la redaktoro povas pli facile simpligi vian interesan artikolon, ol aldoni intereson al facillingva, sed banala artikolo. Se vi ne sukcesas sufiĉe simpligi la lingvaĵon, tamen sendu vian artikolon!

La redaktoro rezervas al si la rajton laŭnecese korekti, mallongigi kaj simpligi artikolojn.

Facileco

La facillingvaj artikoloj de Kontakto aperas en du niveloj:

Tre **facila** *Uzu nur tiujn elementojn de la listo, kiuj aperas grase presitaj, plus tiujn de **Aldone**. Se vi deziras uzi alian radikon, necesas klariĝi ĝin en la artikolo mem aŭ aldoni piednoton.*

Facila *Vi rajtas uzi ĉiujn elementojn de la listo. La ceterajn necesas klarigi.*

Longeco

Verku ne tro longajn artikolojn! Prefere ĝi ne enhavu pli ol 800 vortojn. Se vi opinias, ke tio ne sufiĉas, verku pri unu aspekto de via temo pli profunde.

Stilo

Uzu simplajn frazostukturojn kun kutima vortordo. Evitu pezajn kunmetaĵojn. Prefere ne uzu verbajn substantivojn, se eblas uzi verbon anstataŭe.

Gramatiko

Je la nivelo *Facila* jam estas uzata la tuta baza gramatiko. Je la nivelo *Tre Facila* oni ne uzas la participojn (krom la substantiva finaĵo “-anto”, necesa en vortoj kiel leganto, prezidanto).

Nomoj

Vi rajtas libere uzi nomojn de landoj, lingvoj, popoloj kaj urboj. Ne Esperantigu propran nomon, sed uzu Esperantan nomon nur se ĝi jam ekzistas! Prefere uzu nacilingvan (latinalfabetan) formon, kaj aldonu inter krampoj la prononcon.

Aldone

Uzeblas ĉiuj oficialaj afiksoj, gramatikaj finaĵoj, korelativoj, pronomoj, tag- kaj monatonomoj, numeraloj, kunmetitaj vortoj formitaj el la listigitaj elementoj kaj la plej konataj mallongigoj.

Pri ajnaj demandoj kontaktu la redakcion!

Abon- Aĉet- Adres- Aer- Afabl- Afer- Ag- Agrabl- Aĝ- Ajn Akcept- Akr- Aktiv- Akv- Al- Almenaŭ Alt- Am- Amas- Ambaŭ Amik- Amuz- Angul- Anim- Ankaŭ Ankoraŭ Anonc- Anstataŭ Antaŭ Aparat- Apart- Aparten- Apenaŭ Aper- Apud Aranĝ- Arb- Art- Artikol- Asoci- Aspekt- Atak- Atend- Atent- Ating- Aŭ Aŭd- Aŭskult- Aŭtobus- Aŭt(omobil)- Aŭtun- Av- Azen-	Ĉef- Ĉemiz- Ĉes- Ĉeval- Ĉi Ĉiel- Ĉirkaŭ Ĉu Da Danc- Danger- Dank- Daŭr- De Decid- Defend- Dekstr- Demand- Dens- Dent- Desegn- Detal- Dev- Dezir- Di- Diferenc- Difin- Dik- Dir- Direkt- Disk- Diskut- Divers- Divid- Do Doktor- Dolĉ- Dolor- Dom- Dom- Domaĝ- Don- Donac- Dorm- Dors- Drat- Dub- Dum Dung-	Fiŝ- Flag- Flank- Flav- Flor- Flu- Flug- Foj- Foli- Fond- Font- For Forges- Fork- Form- Fort- Fos- Fot- Frap- Frat- Fraŭl- Fremd- Frenez- Freŝ- Frost- Fru- Frukt- Fulm- Fum- Funkci- Fuŝ- Gaj- Gajn- Gas- Gast- Gazet- Glaci- Glas- Glit- Grand- Gras- Gratul- Grav- Gren- Griz- Grup- Gust- Gvid-	Eben- Eĉ Eduk- Edz- Efektiv- Efik- Egal- Ekonomi- Ekskurs- Ekspozici- Ekster Ekzamen- Ekzempl- Ekzerc- Ekzist- El Elekt- En Energi- Erar- Esper- Esplor- Esprim- Est- Estim- Eventual- Evolu-	Facil- Faden- Fajr- Fak- Fakt- Faktur- Fal- Fam- Famili- Far- Fart- Feliĉ- Fenestr- Fer- Feri- Ferm- Fiks- File- Film- Fin- Ĉar Ĉe	Ĝef- Ĝemiz- Ĝes- Ĝeval- Ĝi Ĝiel- Ĝirkaŭ Ĝu Da Danc- Danger- Dank- Daŭr- De Decid- Defend- Dekstr- Demand- Dens- Dent- Desegn- Detal- Dev- Dezir- Di- Diferenc- Difin- Dik- Dir- Direkt- Disk- Diskut- Divers- Divid- Do Doktor- Dolĉ- Dolor- Dom- Dom- Domaĝ- Don- Donac- Dorm- Dors- Drat- Dub- Dum Dung- Ĝarden- Ĝen- Ĝeneral- Ĝentil- Ĝis Ĝoj- Ĝu- Ĝust- Ha Halt- Har- Haŭt- Hav- Haven- Hejm- Hel- Help- Herb- Hieraŭ Histori- Ho Hodiaŭ Hom- Hor- Horlog- Hotel- Hund-	Ide- Ideal- Imag- Imit- Industri- Infan- Inform- Insekt- Insign- Instru- Insul- Intelligent- Intenc- Inter Interes- Intern- Invit- Ir- Ja Jam Jar-	Je Jen Jes Juĝ- Jun- Jup- Just- Ĵet- Jus Kadr- Kaf- Kaj Kajer- Kalendar- Kalkul- Kamp- Kant- Kap- Kapabl- Kapt- Kar- Karb- Kart- Kased- Kaŝ- Kat- Kaŭz- Kaz- Ke Kelk- Kilogram- Kilometr- Kis- Klar- Klas- Klin- Klopod- Klub- Knab- Kol- Kolekt- Koler- Kolor- Komb- Komenc- Komer- Komfort- Komisi- Komitat- Kompar- Kompat- Kompren- Komput- Komun- Komunik- Kon- Koncern- Kondiĉ- Konduk- Konfes- Kongres- Konkret- Konsent- Konserv- Konsider- Konsil- Konsist- Konstant- Konstru- Kontakt- Kontent- Kontraŭ Met- Konven- Konvink- Kopi- Kor- Korb- Korespond- Korp- Kort- Kost- Kostum- Kovert- Kovr- Krajon- Kre- Kred- Kresk- Kri- Krom Kruel- Kruur- Kudr- Kuir- Kuk- Kuler- Kulp- Kultur-	Kun Kupon- Kur- Kurac- Kuraĝ- Kurs- Kuŝ- Kutim- Kuz- Kvadrat- Kvalit- Kvankam Kvant- Kvazaŭ La Labor- Lac- Lag- Lakt- Land- Lang- Larg- Las- Last- Laŭ Lav- Lecion- Leg- Legom- Leg- Lern- Lert- Leter- Lev- Liber- Libr- Lig- Lign- Lim- Lingv- Lin- Lip- List- Lit- Liter- Literatur- Log- Lok- Long- Lud- Lum- Lun-	Muzik- Naci- Naĝ- Nask- Natur- Naz- Ne Nebul- Neces- Neg- Nek Nep- Nepr- Neŭtral- Nev- Nigr- Nivel- Nokt- Nom- Nomb- Nord- Normal- Not- Nov- Nu Nub- Numer- Nun Nur Obe- Objekt- Odor- Ofic- Of- Okaz- Okcident- Okul- Okup- Ol Ole- Onkl- Opini- Or- Ord- Ordinar- Ordon- Orel- Organiz- Orient- Original- Ost- Ov-	Pac- Pag- Paĝ- Pak- Palp- Pan- Pantal- Paper- Par- Pardon- Park- Parol- Rand- Pas- Paŝ- Patr- Pec- Pen- Pend- Pens- Pentr- Per Perd- Perfekt- Period- Permes- Person- Pet- Pied- Pik- Pilk- Plaĉ- Plafon- Plan- Plank- Plant- Plast- Plej Plen- Plend- Plezur- Pli Plor- Plu Plum-	Plur- Plus Pluv- Po Poem- Poent- Poezi- Polic- Politik- Pont- Popol- Popular- Por Pord- Port- Post Postul- Poŝ- Poŝt- Pot- Pov- Nord- Praktik- Prav- Precip- Preciz- PREFER- Preĝ- Prieg- Prem- Premi- Pren- Prepar- Pres- Preskaŭ Prefer- Preĝ- Prieg- Prem- Premi- Pren- Prepar- Pres- Preskaŭ Pri Princip- Printemp- Pro Problem- Produkt- Profund- Program- Progres- Projekt- Proksim- Promen- Promes- Propon- Propr- Prov- Prunt- Publik- Pun- Punkt- Pup- Pur- Pantal- Paper- Par- Pardon- Park- Parol- Rand- Pas- Paŝ- Patr- Pec- Pen- Pend- Pens- Pentr- Per Perd- Perfekt- Period- Permes- Person- Pet- Pied- Pik- Pilk- Plaĉ- Plafon- Plan- Plank- Plant- Plast- Plej Plen- Plend- Plezur- Pli Plor- Plu Plum-	Rubrik- Ruĝ- Rul- Saĝ- Sak- Sal- Salon- Salt- Salut- Sam- San- Sang- Sankt- Sat- Sav- Sci- Scienc- Se Sed Seĝ- Sek- Sekretari- Seks- Sekv- Semaj- Sen Senc- Send- Sent- Serĉ- Seri- Serioz- Serv- Sezon- Sid- Sign- Signif- Silent- Simil- Simpl- Sinjur- Sistem- Situaci- Skatol- Skrib- Soci- Soif- Sol- Soldat- Solv- Somer- Son- Spec- Special- Spegul- Spert- Spez- Spic- Spir- Spirit- Sport- Staci- Star- Stat- Stel- Strang- Strat- Streĉ- Stud- Stult- Sub Subit- Sud- Suf- Sufiĉ- Sukces- Suker- Sum- Sun- Super Supoz- Supr- Sur Ŝaf- Ŝaj- Ŝanc- Ŝanĝ- Ŝat- Ŝerc- Ŝip- Ŝir- Ŝlos- Ŝnur- Ŝrank- Ŝtat- Ŝtel- Ŝtof- Ŝton- Ŝtrump-	Ŝtup- Ŝu- Tabl- Tabul- Tag- Tamen Tas- Task- Taŭg- Te- Teatr- Tegment- Tekst- Telefon- Teler- Televid- Tem- Temp- Ten- Teori- Ter- Terur- Tim- Tir- Tond- Tra Tradici- Traduk- Traf- Trakt- Tranĉ- Trankvil- Trans Tre Trink- Tro Trov- Tru- Tuj Tuk- Turism- Turist- Turn- Tut- Universa- Universitat- Urb- Util- Uz- Vagon- Valid- Valor- Varm- Vast- Vek- Ven- Vend- Venk- Vent- Ver- Verd- Verk- Vesper- Vest- Veter- Vetur- Vian- Vic- Vid- Vigl- Vilaĝ- Vin- Vintr- Vir- Viŝ- Viv- Vizaĝ- Vizit- Voĉ- Voj- Vojaĝ- Vok- Vol- Volv- Vort- Vost- Zorg-
--	---	---	---	---	--	---	--	---	---	---	--	--	--

Subtenu la agadon de TEJO!

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi povas helpi ankaŭ al konkretaj agaderoj de TEJO.

Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi la UEA-konto “tejtej” (indiku la celon de la donaco, ekz: “donaco por KER” aŭ “donaco por landa agado”). Ankaŭ eblas fari donacon por specifaj celoj:

- Fonduso “Partoprenu IJKon” – per ĝi TEJO subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj en IJK;
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO.

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe <www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html> aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

JUNA AMIKO – Internacia E-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

Modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al Koresponda Servo Mondskala jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj.

Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, ne uzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B. P. 6, FR-55000, Longeville-en-Barrois, Francio**

KOTIZTABELO DE UEA POR 2009

MG Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T) Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago)

MA(-T) Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto

MA ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto

SA Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA

Kto Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO

SZ Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	56	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Belgio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	7	18	45	29	18	90
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	425	2100
Danio/krono	70	175	440	280	180	880
Estonio/krono	100	240	600	380	245	1200
Finnlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Francio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Germanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Greklando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hispanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hungario/forinto	1600	4000	10000	6400	4000	20000
Irlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Islando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Japanio/eno	1500	3700	9200	5500	3300	18400
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Latvio/lato	4	11	27	17	11	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zloto	20	50	130	80	50	260
Portugalia/eŭro	8	20	50	32	20	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	17	84
Slovenio/eŭro	7	18	45	29	18	90
Svedio/krono	90	220	550	350	220	1100
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	79	47	28	158
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	6	16	40	24	14	80

ALIAJ LANDOJ Luksemburgio laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFO A Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

